# ĈEA-Retkomunikoj 2012/04

ĈEA-Retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

Enhavo:

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO
2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO
3. STARTO 2012/4 APERIS
4. JARFINA ALVOKO!
5. ELDONO DE ĈEĤA-ESPERANTA FRAZEOLOGIO DE JOSEF CINK
6. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ
7. DOSIEROJ OMAĜE AL LA ZAMENHOFA-TAGO
8. PLUAJ NOVAĴOJ EN LA MUZEA PAĜO ĈE IPERNITY
9. ĈEJ AKTIVAS
10. LISTO DE ARANĜOJ
11. BONDEZIROJ

## 1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO

Jen la lasta numero de ĈEA-Retkomunikoj en jaro 2012. Eble vi ne legos ĝin tuj nun, sed post kristnaskaj festoj, sed ĉiukaze mi esperas, ke ankaŭ tiu ĉi numero plaĉos al vi. Tamen, permesu al mi esprimi kelkajn dank-frazojn. Unue, mi ŝatus danki por la kunlaboro de mia redakta teamo, nome Pavla Dvořáková, Petr Chrdle kaj Marek Blahuš. Due, miaj dankoj estas celitaj al tiuj, kiuj dum tiu ĉi jaro sendis al nia redakta teamo informojn pri novaĵoj, aranĝoj kaj tiel helpis al estiĝo de ĉiam bunta nova eldono de Retkomunikoj. Trie, mi ŝatus danki al VI! Jes, al VI, kara leganto! Al vi ankaŭ apertenas mia danko, ke vi legas ĈEA-Retkomunikojn.

## 2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO

Kiel tradicie, ankaŭ tiu ĉi eldono de ĈEA-Retkomunikoj en PDF-formato elŝuteblas ĉi tie:

Arkivo de Retkomunikoj troveblas ĉi tie.

## 3. STARTO 2012/4 APERIS

En elektronika formo en PDF-formato vi povas ĝin elŝuti kaj legi klakinte al ĉi-tiu ligilo.

Ni atentigas, ke laŭ decido de la konferenco en Břeclav ekde la sekvonta numero la gazeto alireblos kiel membrecavantaĝo NUR por membroj de ĈEA (nove eblos elekti ankaŭ rabatitan varianton kun kodigita aliro nur al elektronika Starto). Paperforman Starton eblos ricevadi plu ankaŭ surbaze de abono (info ĉe starto@esperanto.cz). Ceteraj povos legi la gazeton surrete kun unujara prokrasto. Validas, ke informojn en www.esperanto.cz kaj Retkomunikojn ni plu senpage disponigos al ĈIUJ interesitoj.

## 4. JARFINA ALVOKO!

En tiu ĉi lasta numero de la jaro ni ŝatus danki al ĉiuj niaj legantoj por ilia atento kaj favoro kaj ankaŭ aparte al ĉiuj ĈEA-membroj por ilia morala kaj financa subteno kaj event. aktiveco! Ni rememorigas, ke kun fino de la jaro (esperebIe ne de la mondo) alvenas ankaŭ la tempo por (re)pagado de membrokotizoj kaj ni dankas ĉiujn, kiuj ĉi-kampe ne forgesis/ne forgesos nin. Ni volus rimarkigi, ke ĉiujn informservojn ni pretigas kaj disponigas por ĉiuj (do ankaŭ por niaj nemembroj) kiel volontuloj kaj senpage, kvankam ni ankaŭ havas elspezojn por tio (ekz. pago por domajno www.esperanto.cz ktp). Simile validas ankaŭ por aliaj aktivecoj de ĈEA (aranĝoj, muzeo kun movada arkivo, ekspozicioj, publika informado, ciferecigado ktp.). Se Esperanto estas por vi ankaŭ io pli ol nura privata hobio kaj amuzo, ni tre aprezos, se vi decidos subteni niajn projektojn ĉu per via event. membriĝo aŭ eĉ eta financa subteno. Ankoraŭ pli ol la mono mem gravas ankaŭ homoj kiuj emas ion aktive fari por la aliaj! Ni bonvenigos ĉiujn interesitojn pri kunlaboro, ĉu jamajn membrojn, ĉu novulojn! En nia agado ĉiu certe povos trovi sferon laŭ sia intereso kaj kapabloj.
Pri la nova membrokotiza regularo, membrecavantaĝoj kaj pagmanieroj ĉeĥoj povas legi detalojn ĈI-TIE.
Niaj eksterlandaj legantoj, kiuj volus iel ajn finance kontribui aŭ aliel subteni nin aŭ internacie aktive kunlabori kun ni, povas pritrakti optimumajn eblecojn kun la ĈEA-prezidanto kaj kasisto ĉe la adreso cea@esperanto.cz. Ni elkore antaŭdankas al ĉiuj volontemuloj!

## 5. ELDONO DE ĈEĤA-ESPERANTA FRAZEOLOGIO DE JOSEF CINK

Ĝis 31.12.2012 vi havas la eblecon favorpreze (kontraŭ 160,-CZK) antaŭmendi tiun ĉi unikan nemalhaveblan libron, nun finpretigatan, kaj aperontan en printemppo 2012. Post eldono la libro estos ĉ. je 40,-CZK pli kosta.
Ĉ. 12 mil (!) fraz- kaj vortunuoj sur 310 paĝoj.
Detalojn pri mendo kaj manieroj de transpago vi povas legi (ĉeĥlingve) en jena paĝaro.

## 6. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ




Peter Baláž - Esperantisto de la jaro 2012

Kristnaskaj aktualaĵoj en Youtube kaj Ipernitio

Novaj elsendoj de Verda Stacio

Nova rubriko en paĝaro www.esperanto.cz "Interesaj filmoj": Comprar, tirar, comprar

Kaj pri kio vi povos legi baldaŭ? Pro ŝanĝoj en tarifoj de Ĉeĥaj fervojoj ni planas ĝisdatigi artikolon pri malmultekosta vojaĝado, do baldaŭ vi povos legi pri ŝanĝoj de prezoj kaj ofertoj :) Ankaŭ ni planas aperigi iun resumon de jaro 2012.

Nur en la ĉeĥa lingvo: (pouze v češtině):
Nový příspěvkový řád a úvaha nad smyslem členství
(Nova membrokotiza regularo kaj pripenso pri senco de la membreco)

O esperantské škole v Bartošovicích referovala regionální televize
(Pri Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice raportis la regiona televido)


Vyšlo Starto 2012/4
(Aperis Starto 2012/4)

Virtuální adresa @esperanto.cz
(Virtuala adreso @esperanto.cz)

O putovní výstavě (a nejen o ní) opět v brněnském rozhlase
(Pri migra ekspozicio (kaj ne nur pri ĝi) denove en la radio Brno

Varhanní doprovody k vánočním koledám (s texty v esperantu)
(Orgenakompanoj por kristnaskaj kantoj - kun tekstoj en Esperanto)

## 7. DOSIEROJ OMAĜE AL LA ZAMENHOFA-TAGO



Dosieroj rilate al la Zamenhof-Tago

Fotogalerio pri L.L.Zamenhof

Maksimoj de Zamenhof (sonregistraĵo de liaj plej konataj eldiroj kaj pensoj)

ZEOj en Aŭstralio kaj tra la mondo (videoprelego)

## 8. PLUAJ NOVAĴOJ EN LA MUZEA PAĜO ĈE IPERNITY



**Sonregistraĵoj:**

Amo dia amo (Lásko bože lásko) - popolkanto el Trilanda konferenco

Jiří Kořínek - poemo Giuseppe Verdi

Fráňa Šrámek - Decembro (poemo) - paralele ĉeĥe kaj Esperante

Ho ĝojiga vi  (Oh du fröhliche) - kristnaska kanto

Irving Berlin - Kristnasko blanka (White Christmas)

**Videoregistraĵoj:**

Ho blanka vino (Vínečko bílé) - komuna kantado dum la Trilanda konferenco

Registri per Soundcloud - instrukcia filmeto de Emilio Cid el Brazilo

Kristnasko (Video-Evangelio)

Ho paŝtistoj betlehemaj (animacia filmeto kun hispana kristnaska kanto)

## 9. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

(oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) pro personaj kialoj antaŭtempe la 20-an de oktobro dum naŭa ĝenerala asembleo en Světlá nad Sázavou elektis novan estraron. Nova prezidanto estas Vít MIŠUREC, anstataŭ Daniel MRÁZEK, kiu fariĝis revizianto. Vicprezidantino restas Barbora ZÁVODSKÁ. Kiel kasisto oficos Jan ŠEBETOVSKÝ, anstataŭ Dagmar CHVÁTALOVÁ, estraranino en 2005-2012, okaze de kies edziniĝo kun Jiří MATĚJŮ la 25-an de aŭgusto ni kore gratulas. La revizian komisionon aldone membras Marek BLAHUŠ (prezidanto) kaj Miroslav HRUŠKA. La elekton kaj antaŭan enurban programon partoprenis ses personoj.

Komencnovembre ĈEJ-anoj kunorganizis renkontiĝon de E-mentál en Žatec, kiun partoprenis 10 esperantistoj el 3 landoj kaj kiu inkluzivis viziton de bierproduktejo, urbopromenon kaj amuzan programon.

Ŝanĝe de novembro kaj decembro okazis en Ústí nad Orlicí semajnfina Ĉelima Aŭtuna Renkontiĝo (ĈAR) kiun por novuloj okazigis ĈEJ kunlabore kun la vroclava junulara grupo Aŭroro. Partoprenis 14 junuloj el Pollando, Ĉeĥio, Slovakio kaj Rusio.

La Brnan klubon de ĈEJ novembre kvartage vizitis germano Andreas MÜNCHOW, kiu trarigardis la urbon, renkontis la plenkreskulan klubon kaj poste kun kvar junuloj pluiris al KAEST en Slovakio. Jam la 31-an de oktobro plenkreskuloj kaj junuloj (tiuj en teejo) akceptis samtempe tri eksterlandanojn: argentinano Rodrigo GIMÉNEZ faris en Brno kelksemajnan staĝon kaj geedza paro Ben INDESTEGE (Belgio) kaj Hati ALIEVA (Ukrainio) haltis petveture.

En Brno ekstudis Václav ZOUZALÍK, kiu somere kadre de sia studkonkludo ĉe konstrulernejo en České Budějovice defendis 43-paĝan jarfinan studlaboraĵon pri Esperanto. Nome de ĈEJ ĝian ellaboradon asistis Marek BLAHUŠ, kiu komencdecembre gastis ĉe Jiří GALUŠKA en Konstanz kaj renkontis esperantistojn en Ulm, Konstanz kaj Friedrichshafen.

La praga ĈEJ-klubo kunvenis la 13-an de decembro okope (4 ĈEJ-anoj) en klubejo de la plenkreskula klubo kaj festis la Zamenhofan tagon ĉe la ZEO en Vyšehrad. Brnaj esperantistoj ĉeestis la 15-an de decembro kvarope (2 junuloj) dum AEF-festo en Vieno, kie Marek BLAHUŠ kaj Miroslav MALOVEC kune donis la ĉefprelegon. Korekto de la pasinta numero: Vít MIŠUREC ne jam ekstudis en Italio kiel anoncite.

Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe http://cej.esperanto.cz/

## 10. LISTO DE ARANĜOJ



2012-12-29: Tradicia silvestra balo - Esperanta Silvestro en Česká Třebová, Info: jk.esperanto@seznam.cz

2013-01-02/3: Migra ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ en enirhalo de la Pedagogia fakultato de la Masaryk-Universitato en Brno, strato Poříčí 9-11  Info: jvojesp@gmail.com

2013-01-03/06: La XXXI-a Poludnica. Internacia renkontiĝo de vojaĝantoj-esperantistoj ĉe la monto Poludnica en Malaltaj Tatroj.

2013-03-08/10: 3-a BIERO en Vyškov - Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo, organizas ĈEJ kaj E-mentál. Info: pismis@volny.cz

2013-04-15/21: 37-a Lingva seminario en Skokovy. Tradicia semajna seminario en pensiono ESPERO en Skokovy (norde de Prago).

2013-04-18/21: 8-a Sabla printempo en Skokovy. Kadre de la 37-a Lingva seminario, kun la ĉeftemo "Voĉregistrado".

2013-05-18: Printempa renkontiĝo de EK Šumperk

2013-05-17/19: Komuna kunveno de ĉeĥa kaj slovaka sekcioj de IKUE

2013-06-08: Muzea Nokto en Svitavy (la dato estas proponita kaj ev. ŝanĝebla de la Urba Muzeo) kun inaŭguro de la nova tutjara ekspozicio (ĉi-foje pri arta kreemo de esperantistoj) Info: svitavy@esperanto.cz

2013-06-15: Infana Tago en Svitavy. Informoj: svitavy@esperanto.cz

2013-06-16: Renkontiĝo je Granda Ĉantorio. Turisma renkontiĝo de ĉeĥaj, slovakaj kaj polaj esperantistoj.

2013-08-03/10: KELI-kongreso en Svitavy

2013-09-07 La 7-a Postferia Renkontiĝo (plej probable en Vodňany/Bavorov) Info: pisek@esperanto.cz

2013-09-28/29: Jubilea solenaĵo en Svitavy. Festoj de kvina naskiĝtago de Esperanto-Muzeo kaj 80 jaroj de esperanto en Svitavy.

2013-10-25/28: Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Loko precizigota.

2013-11-30: Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek

Ĉeĥlingvaj prelegoj en Esperanto-Muzeo Svitavy - Přednášky v češtině v Muzeu esperanta Svitavy

2012-01-17: 137. cestovatelský večer – republika Tuva (18:30)
2012-01-31: Historie papírových platidel v českých zemích (18:30)
viz fotogalerie na muzejním webu.

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al retkomunikoj@esperanto.cz. Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.



## 11. BONDEZIROJ

Nome de la redaktokonsilio de ĈEA-Retkomunikoj kaj ankaŭ propranome mi deziras al ĉiuj abonantoj de la ĈEA-Retkomunikoj agrablajn kristnaskajn kaj jarŝanĝajn festotagojn kaj sukcesan jaron 2013.
Miro Piro (Miroslav Hruška), redaktoro de ĈEA-Retkomunikoj

Kontakto kun ĉefredaktoro: Miroslav Hruška – retkomunikoj@esperanto.cz
Redakta teamo: Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Marek Blahuš